

EKO 2025

Bleko kun eño

Komuniko 2025/1. Januaro 1, Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sume 300 KB

Esperantisto de la Jaro

Jen la anonco pri kiel partopreni en la Premioj *Juna Instruisto de la Jaro* kaj *Instruisto de la Jaro 2025*. Temas pri kunlaboro de TEJO kaj ILEI.

<https://www.ilei.info/novajxoj/Instruistoj-de-la-jaro.pdf>

Alessandra <adella

Fabeloj elektronikaj

Mi informas vin, ke mia fabellibro aperis kaj jam deŝuteblas, legeblas ĉe la Hungara Elektra Biblioteko. Mi petas vin legi ĝin kaj informi viajn esperantistajn gekonatojn pri la apero de la nova esperantlingva literaturaĵo. La titolo de la volumo estas: *Imperio de Feino Hellas*. Ĝia aperejo estas: <https://mek.oszk.hu/25800/25890>

s-ino Adri Pásztor, Hungario

Galega literaturo – el la nord-okcidenta Hispanio

Ĝustatempe por la Tago de la Libro en Esperanto, aŭ Zamenhof-Tago, la Fondaĵo Vicente Risco, kiu konservas kaj disvastigas la verkon de Vicente Risco

(https://eo.wikipedia.org/wiki/Vicente_Risco),

grava intelektulo de Galegio dum la pasinta jarcento, publikigis libron kun kolekto de 50 citaĵoj de tiu aŭtoro, kun titolo "Galegio estas mondo", danke al la traduko de Alejandro Pareja. La libron (kiel kovrilon mi aldonas al la mesaĝo) kuneldonis la Fondaĵo Esperanto de Zaragoza, kaj ekzempleroj de ĝi estas disponeblaj ĉe tiu institucio.



<https://radioliverdade.com/axenda/galegio-estas-mundo-obra-de-vicente-risco-en-esperanto/>

José Antonio del Barrio, Fundación Esperanto, <http://www.esperanto.es/fundacion/>

Onda elstarigo por hungara aktivulino

Eszter (Stela) Besenyei-Merger, 37-jara denaska esperantistino el Hungario, estas elektita kiel la Esperantisto de la Jaro 2024. Legu la gazetaran komunikon en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2024/12/jaro-8/>

Togolando festas

Lomeaj geesperantistoj memorfestis la 14-an de decembro 2024, la naskiĝtagon de Zamenhof. Ni estis deko da personoj el preskaŭ ĉiuj anguloj de la togolanda ĉefurbo. Estis interesaj kaj mojosaj aktivaĵoj precipe pri la Esperanta kulturo.

Tiu ĉi kulturo estos prezentata dum la Arta Salono de Lomeo, kaj aparte en la tago de la 27-a de decembro al multaj aliaj agantoj de la arta mondo de Togolando kaj aliaj landoj.



lonel Oneŝ elstarigita en noveca komunikilo

Aperis artikolo pri la vivrakonto de lonel Oneŝ en la retejo Géo-récits

<https://urlr.me/qZfxMD>

La projekto Geo-Rakontoj estas noveca iniciato, kiu celas al kolekto kaj disvastigo de scio pri la migraj padoj de sciencistoj, artistoj kaj intelektuloj alfrontintaj vivdanĝerajn situaciojn (militoj, diktatoraj reĝimoj, individuaj persekutoj, ktp.) de la komenco de la 20-a jarcento ĝis hodiaŭ. La celo estas produkti originalan kunlaboran reprezenton de ĉi tiuj trajektorioj per interaktivaj rakontaj kartografioj, permesante al vivrakontoj situigi en interkonektita kunteksto. La kontribuo pri lonel Oneŝ estis verkita surbaze de intervjuoj, kiujn ni realigis kunlabore kun Javier Alcalde okaze de la UK en Torino en 2023.

Ni aparte ĝojas, ke la unua esperantista biografio de Geo-rakontoj prilumas lonel Oneŝ, kiu dediĉas sian tutan vivon al disvastigo de esperanto-libroj kaj kulturo.

Pascal Dubourg Glatigny, Guilherme Fians, Catherine Gousseff

Duolingo ankoraŭ alirebla por kvar lingvoj

La kvar Duolingo-kursoj de Esperanto, pere de la hispana, portugala, franca kaj angla, ankoraŭ estas alireblaj. Nur tiu de la angla estas facile trovebla. La aliaj malaperis el la listoj videblaj ene de Duolingo. Ĝis hodiaŭ, mi havis la miskomprenon, ke homoj, kiuj jam komencis uzi kurson per la hispana, portugala, aŭ franca, povus daŭrigi; sed ke nova aliĝo ne eblus. Tio estas malĝusta:

- Hispana: <https://www.duolingo.com/course/eo/es/Learn-Esperanto>
- Portugala: <https://www.duolingo.com/course/eo/pt/Learn-Esperanto>
- Franca: <https://www.duolingo.com/course/eo/fr/Learn-Esperanto>
- Angla: <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto>

Derek Roff, Usono. derek@unm.edu

Alvenas la Ĉina Jaro de la Serpento

Jen artikolo pri inaj serpentok. Kiuj sendis al ni el Ĉinio Alessandra Madella.

<https://esperanto.cri.cn/2024/12/30/ARTI1735567962726102>

BET 59 – jen la oferto

La 59-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazos en Litovio inter la 5-a kaj 13-a de Julio, 2025 en la dua urbo de Litovio Kaunas, en la universitato Vytautas La Granda, kiu kun Monda Centro de Litovoj estas kunorganizantoj de BET-59. Informoj <https://sezonoj.ru/2024/07/bet-146/>



Reta aliĝilo al BET-59: <https://mallonge.net/bet59>. BET-59 estos altnivela internacia aranĝo kaj programe kaj organize. Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj. Aktualigataj informoj estas en la retejo

: <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=bet59>

Informojn pri BET-59 liveras la Eventa Servo <https://eventaservo.org/e/BET-59>

Listo de jamaj aliĝintoj al BET-59 estas ĉi-tie:

http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=bet59&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=15

Artikolo pri urbo de BET-59 Kaunas estas ĉi-tie: <https://sezonoj.ru/2024/09/bet-148/>

Videofilmeto pri Litovio en Esperanto estas spektebla ĉi-tie:

http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=5

Mario Migliucci, itala aktoro, teatra aŭtoro kaj esperantisto, prezentos sian spektaklon 'Doktoro Esperanto'. Legu pli pri Mario kaj lia spektaklo ĉe <https://sezonoj.ru/2024/10/bet-150/>

Amri Wandel, profesoro pri astrofiziko en la Universitato de Jerusalemo kadre prelegos pri astrofiziko. Konatiĝu kun li en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* kaj pensu pri aliĝo al BET-59 <https://sezonoj.ru/2024/10/bet-151/>

Eŭheno Kovtonjuk Konatiĝu kun la ukraino, kiu prelegos pri *La vivo kaj verkado de la blinda ukraina esperantisto Vasył Eroŝenko*: <https://sezonoj.ru/2024/11/bet-154/>.



Laura Brazzabeni, la itala instruistino kaj esperantistino prelegos pri instruado de Esperanto kaj pri disvastigo de Esperanto pere de radio.

La pola kantista duopo Suzana (Zuzanna Kornicka) kaj Mirek Bartkowiak prezentos sian koncerton *SuMi – 30 jaroj pasis*, Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2024/10/bet-152/>

Jean-Marc Leclercq, populara Esperanto-kantisto el Francio, konata kiel JoMo kaj jOmO, koncertos, ..

Aminde el Madagaskaro

Jen la elsendo numero 144 de Aminda Radio Esperanto el Malagasio Krom kelkaj lokaj novaĵoj, ni provizas al vi ankaŭ artikolon pri situacio de la tradukado kaj interpretado en nia lando. Se nia retradio helpas vin pli scii pri Malagasio, ne hezitu finance subteni ĝin cele al ĝia materiala plibonigado. <https://youtu.be/xQ5LndCfXQE>

Azia disvastigo rezulte de volontuloj

El la parolado la partoprenintoj informiĝis, ke la la kursanoj de la klubo venas el la tuta lando krome Tibeto, Honkongo, Makao kaj Tajvano per retaj Esperanto-kursoj; La klubo atingis la Esperanto-disvastigon en la tutlanda skalo per funkciigo de la reta Esperanto-kurso por Ĉina Asocio de Volontuloj. La klubo sukcese faris la prelegon pri Esperanto por La Novaĵa Lernejo de Liaoninga Komunika Universitato.. La klubo havas Esploran Bazon de Esperanto kaj Proteino-Saliko en Interna Mongolio, kie ĉi-jare dufoje okazis aktivadoj pri Esperanto-instruado.

S-ro Wang Hanping, vic-prezidanto de ĈEL, kiu prezidis la simpozion.

ILEI invitas arde Beograden

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kore invitas vin al la **58-a kongreso de ILEI** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu okazos unufoje **en Beogrado, de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025!** Ĉi tiu evento estos neforgesebla okazo por kunveni, lerni, kaj ĝui la unikan etoson de la ĉefurbo de Serbio. La ĉefa temo de la kongreso kaj ties simpozio estas: **Artefarita intelekto kaj lingvolernado.**

Abundos la turisma kaj kultur-arta programo en la tradicia amika etoso de la ĉefevento de ILEI. Ĉu vi estas ILEI-membro aŭ ne, ĉiuj estas bonvenaj! Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado, kaj ĝenerale ĉiujn esperantistojn de kiu ajn lingvo-nivelo. **Kie vi trovas pliajn informojn?**

- Retejo de la kongreso: 2025.kongreso.org (klaku al la logotipo de ILEI por pluri al la ĉefa paĝo) aŭ 2025.kongreso.org/ilei-chefa.html
- Rekta ligilo al la aliĝilo: 2025.kongreso.org/alighilo.html
- Eventaservo: eventaservo.org/e/ILEI-58

===== vortoj: 1059 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

Ĉiuj kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.